

ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.), fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj Akministracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht), Nederlando

Kunlaborantoj: d-ro E. J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo.) J. Vernoux, sac. (Francujo,) Eusebio Maynar (Hispanujo), Prof. H. G. Wannemakers S. J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d-ro W. J. A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono.).

L O U R D E S

La unua de aŭgusto 1952a. Dektrimil belgaj knabinoj de la Katolika Laborista Junularo, al kiuj post kelkaj tagoj sin kunigis okmil knaboj de la sama movado, superregas la urbon Lourdes kun siaj kantoj, siaj procesioj, siaj dumnoktaj dancoj ĉe la altaro sur la Placo de la Rozario. Perdus en tiu amaso la miloj da italoj, angloj, francoj, nederlandanoj, ktp. La multkoloraj flagoj fiere elportis la moralan venkon de tiu movado, sed ili humile riverencis antaŭ la statuo de la Senmakula Virgulino. Ni jam pripensis la saman efikon de nia Internacia Pilgrimo de Katolikaj Esperantistoj en 1953a

Inter la kunventempoj de tiu giganta manifestacio, al kiu nia prezidanto sac. Beckers devis dediĉi preskaŭ sian tutan tempon, kelkaj estraranoj de I.K.U.E. kunvenis kun kelkaj esperantistoj de la urbo Lourdes por esplori la eblecojn por 1953a.

En 1953a la katolikaj esperantistoj kunvenos en Lourdes en Internacia Pilgrimo, kun decaj aranĝoj, por tie memori la 50-jaran ekzistadon de la revuo 'Espero Katolika', kiu en 1903 estis fondata de pastro Emile Peltier, kies tombo estas en Lourdes.

Lourdes ne estas facila loko. Ne estas permesata tie kongresi laŭ normala maniero. Ĝi estas pilgrimloko. Kaj se ni kunvenos, ni devos observi la regulojn de la pilgrimloko. Do ne predikoj en la baziliko, ni certe devos partopreni la procesiojn de la Sankta Sakramento, kaj tiu de la Lumo en la vespero. Ni devos preĝi kaj envoki ĉe la pordoj de la banejoj, ktp. ktp.

Sed la aranĝoj certe ebligas niajn kutimajn kunvenojn en religia sfero. La proksimeco de la Pireneoj ebligas belajn ekskursojn. Sed ĉar la vivo en Lourdes intense estas kunligata kun la sezono de la pilgrimoj, la aranĝoj devas esti pretaj tre frutempe. Je la unua de novembro la laboroj devas komenci kaj plejlaste la unua de majo ĉio devas esti en bona ordo. Jam estis kontaktoj por rezervi kelkajn hotelojn kaj kunvensalonojn.

Jam nun vi liberigu la tagojn de la 12a - 16a de aŭgusto 1953a por ĉeesti ĉi tiun jubilean kunvenon.

En proksimaj numeroj de E.K. ni publikigos detalojn.

L. G. C. de Jong,
sekretario.

LA DIVIZIOJ DE I' P A P O

Verkis: Episkopo Fulton J. Sheen.

Esperantigis: Marianus.

(Kun eklezia prespermeso.)

Episkopo Fulton J. Sheen, vic-episkopo de Novjorko, katolika verkisto de mondkonata rango, ĉeestis en Fatima la oficialan finsolenon de la plilongigita Sankta Jaro. En la sekvanta artikolo li karakterizas sian impreson de tiu sceno, kiu kunvokis unu milionon da pilgrimuloj en la loko, kie Nia Kara Sinjorino aperis 1917 al tri paŝtistinfonoj:

La 12an kaj 13an de Oktobro 1951 okono de la loĝantaro de Portugalujo, t.e. unu miliono da homoj, migris grandparte piedirante al tiu malgranda loko sur la supro de la montaro, 75 mejlojn for de la ĉefurbo, kaj pasigis tie preĝante tutajn tagon kaj nokton. Tiu malgranda loko estis Fatima.

Pluvegis, kiam la beata Virgulino aperis en Fatima la 13an de Oktobro 1917. La popolo ŝatas pluvon kiel signon de beno. Tiel ankaŭ pluvis sur la 600 000 homojn la 12an de Oktobro 1951, kaj la plimulto el ili staris preĝante la tutan nokton. Nur kelkaj gutoj falis sur la milionon da homoj la 13an de Oktobro, sed sufiĉis por esti simbolo de la gracopluvo. Ŝlimojane speciale invitas al genuflekso kaj preĝado; pluvo ĝenerale ja ne inspiras spiriton kaj korpon. Sed por la piaj pilgrimuloj ambaŭ estis okazo por suferi favore al la paco de la mondo.

Du grandaj ideoj disvastiĝas de Fatima: la unua koncernas la komunismon, la dua la islamon.

1-e: FATIMA, LA PLEJ GRANDA PROVOKO KONTRAŬ LA KOMUNISMO.

Fatima estas la plej modesta loko inter ĉiuj aliaj de la mondo, sed el ĝi eliros la potenco, kiu venkos la komunismon.

La Ruĝa Placo de Moskvo trovas sian plej grandan provokon en la blanka placo de Fatima. La Ruĝa Placo abundegas de bataliloj kaj flagoj, ruĝkoloritaj per la sango de la viktimoj de la komunismo. La blanka placo de Fatima fariĝis vivanta per unu miliono de blankaj flirtantaj naztuko, kiuj salutis Nian Karan Sinjorinon de l'Paco pro vera granda amo.

Moskvo posedas 15 000 000 da batalantoj. Fatima vidis la 13an de Oktobro 1 000 000 da kredantoj, kiuj tenis la Rozarion. Laŭ la mezuro de la Dia Justeco oni sentas, ke tiuj malgrandaj ĉenitaj perloj, kiuj nombras la 'Ave Maria-jn' jam superfortis Ŝtalinson kun lia ŝtalo.

La komunismo devis suferi malvenkon la 13an de Oktobro 1951.

sed tiu-ĉi aktualaĵo ankoraŭ ne fariĝis konata ĝenerale.

Unu miliono da animoj, pretaj por kompenso, certe povas fari la samon por la mondo, kion dek justuloj estus povintaj fari por Sodomo kaj Gomorho. La martelo kaj la falĉileto, la sovjetaj simboloj, estonte ricevos novan signifon per la instigo de la oferoj de Fatima. La martelo, kiu hodiaŭ transformas plugŝtalojn je glavoj, kaj la falĉileto, kiu hodiaŭ distranĉas la korpojn de la vivantoj kvazaŭ tritikon, aliĝos sian aspekton:

La martelo fariĝos kiel kruco, kaj la falĉileto fariĝos kiel la luno sub la piedoj de Maria.

La komunismo estas kredoafero, kaj ankaŭ nur kredo povas superi ĝin. La grandaj nacioj eble povos haltigi la komunistan atakemon, sed ili ne povos haltigi la komunismon mem.

Fatima estas flankatako kontraŭ la komunismo per pentofarado kaj oferado.

Pluvo, malpuraĵo, sendorma nokto kaj granda amo por Nia Kara Sinjorino: jen Fatima! La plimulto de la homoj deziras liton por la nokto; ĉio, kion oni deziras en Fatima, estis Rozario. Tiuj milionoj de malgrandaj perloj, per kiuj la kreduloj efikis dum tuta nokto, estis pli potencaj ol la muskedokugloj en la batalado kontraŭ la komunismo.

Ŝtalin iam mokeme demandis: 'Kiom da diviziĝoj havas la Papo?'

La respondo liveris Fatima: Unu milionon. Ĉiu el ili estas armita per 15 dekoj de eksplodema amo.

Ŝtalin diris, ke li deziras la pacon. Li opinias la pacon de Ĉinujo, Polujo,

la pacon de Koreujo.

Ankaŭ Fatima celas la pacon, sed ŝi scias, ke la paco nur venos, se la homoj antaŭe venkis en la milito, kontraŭ siaj plej grandaj malamikoj: kontraŭ egoismo, malamo kaj pekoj.

En ĉi tiu malhela nebula punkto de la 12a de Oktobro centmiloj da geviroj staris en tiu-ĉi batalo kontraŭ ĉio, kio ne estas Dio, kaj kiam tagiĝis, evidentiĝis, ke

Dio venkis

Kiam Nia Kara Sinjorino aperis en Fatima la 13an de Oktobro 1917, la komunismo ĵus estis komencinta per tio, detruiri la vivinteresojn de la mondo.

Post pluaj 34 jaroj ŝi jam ne ekzistos.

Malaperos la ruĝa diktatoro, kiu inspektas siajn taĉmentojn sur la Ruĝa Placo. Restados Nia Kara Sinjorino de la Kremlo, kiu vidos sur la blanka placo sub siaj piedoj la Marianan Armeon.

Kaj kiam la historiistoj esploros la kaŭzon, kiu ŝanĝis nian mondon kaj navigis al ŝi pacon kaj bonstaton, ili eltrovos, ke tiu kaŭzo ne estis batalo sed **D r e ĝ o**, kaj ne tago, sed punkto,

la malvarma pluvopunkto de la 12a de Oktobro 1951,

la plej granda religia okazaĵo en la historio de la moderna mondo.

2-e: LA MOSLEMOJ KAJ FATIMA.

La dua grava ideo, ligate al Fatima, nome ideo, kiun ŝis nun ŝajne preskaŭ neniu pripensis, estas la interligo de Fatima kun la konverto de la moslemoj. Ekzistas 374 000 000 da moslemoj en la mondo. El ĉiuj religisistemoj ŝuste ili estas plej malfacile konverteblaj. Sed mi estas firme konvinkinta, ke ni spertos en la venontaj jaroj, ke la apero de Nia Kara Sinjorino signifas decidigan ŝanĝon en la historio de la islamo, nome pro tri kialoj.

Estas facile komprenebla, kial Nia Kara Sinjorino elektis Portugalujon: la portugaloj estas bonaj homoj; ili posedas firman kredon kaj profundan komprenon por la oferado. Tamen kial Ŝi elektis ŝuste tian sensignifan vilaĝeton kiel Fatima, pro kio nun la Dipatrino estas nomata 'Nia Kara Sinjorino de Fatima?'

Jen la simpla respondo:

1-e: La filino de Mohamedo, fondinto de la islamo, estis nomata Fatima.

Post ŝia morto Mohamedo skribis: 'Fatima estas la plej sankta inter ĉiuj virinoj krom Maria.' La Korano, kiun Mohamedo verkis, enhavas en la 19a Surro 41 versojn pri Maria. La moslemoj kredas en ŝian Senmakulan Koncepton kaj en ŝian virgan naskon, kvankam ili ne kredas en la Diecon de ŝia Filo. Mi asertas: La plej beata Virgulino intencis, ke ŝi estu famekonata kiel Nia Kara Sinjorino de Fatima, por ke tio estu garantiato kaj signo de espero por la mohamedanoj kaj certigo por tio, ke ili, kiuj pruvis por Ŝi tiel grandan respekton, agnoskos unu tagon ankaŭ ŝian Dian Filon.

2-e: Por koncepti tion, oni nur pripensu la historian fakton, ke Portugalujo estis okupata dum jarcentoj de la mohamedanoj. Kiam ili finfine estis forpelataj, la princo de tiu regiono, kie pli poste okazis la apero de Maria, havis belan filinon, kies nomo estis Fatima. Juna katolika nobelulo enamiĝis en ŝin, kaj Ŝi ne nur restis, kiam la moslemoj forlasis la landon por ĉiam, sed eĉ akceptis la veran kredon farigante katolikino.

Ŝia juna edzo ŝanĝis la nomon de la loko, kie okazis la edziĝfesto kun la lasta islamano, nomante ĝin Fatima.

Kaj tiamaniere la placo, kie en la jaro 1917 aperis la Dipatrino, efektive havas historian interligon al Fatima, filino de Mohamedo.

3-e: Kaj lasta indiko pri la interligo de Fatima kaj la islamo estas la entuziasma akcepto, kiun la moslemoj en Afriko kaj Hindujo kaj aliloke aranĝis al la pilgrimanta statuo de Nia Kara Sinjorino de Fatima.

Mohamedanoj permesis la eklezian kulton al Nia Kara Sinjorino de Fatima;

ili permesis religiajn procesiojn kaj eĉ preĝojn antaŭ siaj moskeoj. En Mozambique, kie la moslemoj ĝis nun estis nekonverteblaj, okazis konvertigoj al la katolikismo, post kiam la statuo de la Dipatrino de Fatima estis starigita. Multaj mohamedanoj vizitas nun la katolikajn preĝejojn. La kulto de Nia Kara Sinjorino de Fatima saĝnas al ili tute naturakaj samtempe ankaŭ kiel tributo al ilia Fatima. La misiistoj ekspertos estonte pli kaj pli, ke ilia apostoleca laboro inter la moslemoj farigos sukcesa tiugrade kiel ili submetos ĝin sub la protekto de Nia Kara Sinjorino de Fatima.

Maria estas la Advento de Kristo. Ŝi alportas Kriston al la homoj, antaŭ ol Kristo estas naskita, kiel si alportis la ankoraŭ nenaskitan Kriston al Elizabeto.

Fatima estas kvazaŭ parabolo. En ĝi estas profunde kaŝitaj sekretoj, kiuj ankoraŭ ne estas elsonditaj. Sed io estas certa: Neniu estis inter la miliono da pentofaruloj la 13an de Oktobro, kiu dubis pri tio.

KE NIA KARA SINJORINO DE FATIMA ALPORTOS AL LA MONDO LA PACON. Se aliaj nacioj kune kun Portugalujo pentofaros, tiam venos nek katastrofoj nek milito. Se oni allasos sole al Portugalujo pentofari, tre versajne kaj tre baldaŭ povos veni ia mondkatastrofo, antaŭ ol sekvos la paco. Kelkaj noktogardadoj povas fariĝi tre potencaj por la paco en la mondo.

La estontecon nur Dio konas, sed kion alportos la estonteco, tio multgrade dependos de tio, kiel ni pasigos niajn tagojn. Ju pli ili similos al la 12a kaj 13a de Oktobro de Fatima, des pli rapide venos la paco kaj konvertiĝos Rusujo.

'Jam ne kaj ne nur la Anĝelo de l' Sinjoro, sed la Reĝino de la anĝeloj mem faras jubilean viziton en ĉiuj siaj distriktoj kun ĉiuj miraklobildoj el la plej famaj sanktejoj de la kristaneco, kaj antaŭ ĉio el tiu ĉi sanktejo de Fatima, kie la ĉielo permesis al ni, kroni Ŝin Mondreĝino. En Ameriko kiel en Eŭropo, en Afriko kiel en Hindujo, en Hindonezio kaj Aŭstralio pluvos ĉe ŝia trauro beno el de la ĉielo, multobligas la gracomirakloj tiugrade, ke ni povas apenaŭ kredi, kion vidas niaj okuloj.

Ne nur la bonaj kaj obeemaj infanoj de la Eklezio duobligas sian fervoron, ankaŭ la perditaj infanoj estas ekprenataj de la nostalgio al la Patrino amo kaj revenas al la Patra domo. Eĉ en landoj, kie la lumo de la Evangelio apenaŭ ekkomencis brili, multaj homoj, ankoraŭ ĉirkaŭitaj de la ombro de la eraro atendas (kiu povis imagi tion!) kun sama ardo kiel la kredantoj Ŝian viziton, jubilas al Ŝi en ĝojego, honoras Ŝin, alvokas Ŝin kaj ricevas unikajn gracojn. Sub la Patrino rigardo de la Ĉiela Pilgrimantino ne ekzistas konfliktoj disigantaj inter la nacioj kaj rasoj kaj neniam apartigantaj, neniam intereskontrasto malamikigantaj. Ĉiuj kredas sin feliĉaj en tiu momento, ekkonante fratoj unu la alian. Unika spektaklo, kiu atentigas la plej belajn esperojn!'

Pio XIIa en lia radioalparolo la 13an de Oktobro 1951.

'FINE MIA SENMAKULA KORO TRIUMFOS!'

Ni aŭdis la Papan kaj episkopan voĉojn: Minacas pereco, logas savo! Sed ne restas longa tempo por heziti aŭ eĉ senageme dormi! Do ni agu energie, rapide, rapidege, antaŭ ol la katastrofo nin glutas:

Kio estis ebla en Ameriko, kie jam 6 000 000 samkreduloj solene per propra subskribo promesis, ĉiutage preĝi la Fatima-Rozarion, kie oni preĝas ĝin kune eĉ en fabrikoj kaj kie la radiostacioj aŭdiĝas ĝin ĉiutage; plue: kio estis ebla en Italujo, kie jam 900 000 apartenas al la 'Blua Armeo' de Maria kaj kie same oni povas aŭdi ĉiutage la Rozarion el la ricevilo: tio devas esti ebla ankaŭ en la aliaj landoj. En tempo, kiam Dio publike estas ofendata ĉiutage per sennombraj pekoj, urĝe necesas ke Li ricevu ankaŭ kiel en Ameriko, Italujo kaj alilande publikan

kompenson! Kaj Nia Kara Sinjorino de Fatima indikis la plej taŭgan rimedon!
Do antaŭen!!

Ni katolikoj, grandega armeo en la mondo, milione ĉiutage aŭskultas la dissendojn de la radio, bonajn, parte nebonajn, ne malofte stultajn aŭ eĉ senmoralajn. Sed ni katolikoj pagas ilin kaj do estas responseblaj pri la karaktero de tiuj sendaĵoj! Kaj kiu pagas rajtas ankaŭ postuli, ke oni aŭdu lin. Do mia propono:

Ĉiu paroĥo skribu leteron al la distrikta radiostacio kaj zorgu, ke ĝi estu subskribata de ĉiu sincera paroĥano. Nia junularo kunlaboru, kolektante la subskribojn. Inda tasko por ĝi, speciale ankaŭ por la membroj de la 'Legio Mariae'. En tiu letero oni postulu en la nomo de ĉiuj subskribintoj kaj pro la certigo de la mondpaco kaj pro la feliĉa hejmenreveno de la ankoraŭ maljuste retenataj militkaptitoj, ke: la radiostacio sendu (laŭ interkonsento kun la distrikta episkopo) ĉiutage je favora horo (!) Rozaripregadon kun la aldoneto, kiun la Dipatrino en Fatima deziris post ĉiu 'Gloro al la Patro...':
'Homia Jezuo! Pardonu al ni niajn pekojn, savu nin de la infera fajro, konduku ĉiujn animojn en la Ĉielon, precipe tiujn, kiuj pleje bezonas vian mizerikordon'.

Fincelo:: Ni atingu, ke ĉiuj naciaj radiostacioj sendu tiun pregsendon laueble je la sama horo, por ke ĉiutage levigu cielen
pregadŝtormo!

Oni ne protestu: utopio nerealigebla! For tiaj malkuraĝaj malindaj kontraŭdiroj! Ni katolikoj kiel pagantaj aŭskultantoj estas grandpotenco! Ni utiligu tiun potencon pro la supre cititaj noblaj celoj! Se ĉiuj protestoj ne povis malhelpi tiujn sendojn en Ameriko ktp., kial en aliaj landoj? Kaj se incendio minacas disvastiĝi, ne estas tempo por ludado kaj dancado. Nun tiu publika kompenso certe estas pli urĝnecesa ol ĉiu alia radisendo!
Do ni vete eklaboru! Dio benu nian intencon!

AKADEMIO DE ESPERANTO

*Adreso: Oostduinlaan 32,
Hago, Nederlando.*

Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto

(N-ro 19-Julio 1952)

OFICIALIGO DE LA SUFIKSO -END

Post pristudo kaj voĉdonado la Akademio decidis oficialigi la sufikson *-end'* kun la difino:

'kiu devas esti -ata pro materia aŭ morala trudo; kiun oni estas devigota -i!'

ELEKTOJ POR LA AKADEMIO

En 1952 okazos elektoj kaj rebalotoj por 19 postenoj en la Akademio. Laŭ artikolo 8 de la Statuto kandidatoj povas esti proponataj de ĉiu Esperantista organizajo kaj de ĉiu unuopa Esperantisto, kiu ankaŭ povas proponi sin mem.
Eventualajn proponojn oni bonvolu sendi al la adreso de la Akademio antaŭ la fino de Septembro 1952.

*Ir. J. R. G. ISBRUCKER
Prezidanto.*

**RAPORTO PRI LA KATOLIKAJ ARANĜOJ DUM LA 37-A
UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN OSLO
(2-a ĝis 9-a de aŭgusto 1952)**

Dimanĉe, la 3-an de aŭgusto, okazis je la 9-a en la Olav-preĝejo la Diservo. Kaplano Ludwig Thalmaier (Germanujo), celebris kaj predikis pri la universala karaktero de la katolika eklezio. I. a. li diris 'Estas esence por la katolika eklezio disvastiĝi sur la tuta mondo, ampleksi la tutan homaron. Dum ŝia historio la eklezio ĉiam rifuzis esti eklezio nur por unu nacio. Ĉiuj homoj havas en ĝi la samajn rajtojn, tutegale, ĉu ili estas de blanka aŭ nigra aŭ flava haŭtkoloroj. Aliflanke la eklezio ne volas subpremi aŭ sufoki la bonajn kvalitojn kaj la specialajn kapablojn de la popoloj. Kontraŭe! Ĉiu popolo alportu siajn spiritajn kaj moralajn trezorojn, t. e. siajn plej bonajn kvalitojn kaj kapablojn kaj disponigu ilin al la eklezio. Esperanto estas taŭga ilo por akceli la unuecon kaj la supernaciecon de la eklezio.' Ceestis ĉ. 200 Esperantistoj el diversaj nacioj, kiuj preĝis kaj kantis komune.

Eksc. D-ro Jacobus Mangers, episkopo de Oslo, oficiale partoprenis la Diservon kaj salutis dum ĝi la ĉeestantojn franclingve. Tuj post la parolado liaj vortoj estis tradukitaj en Esperanton. Jen la traduko: 'Tutkore mi salutas vin ĉiujn en la preĝejo de la Sankta Olavo. Mi ĝojas vidante, ke vi klopodas akceli la interkompreniĝon inter la popoloj kaj la homoj. Tiamaniere vi kontribuas al la paco, kiun la homaro tiel urĝe bezonas. Tial mi deziras al Esperanto bonan sukceson kaj mi petas Dion beni viajn klopodojn.' Post la Diservo estis komuna fotografiĝo. Mardon (5.8.) okazis en la universitato la katolika fakkunveno sub la gvidado de kaplano Thalmaier. Li vocleĝis la salutleteron de la prezidanto de IKUE, pastro A.J. Beckers. I. a. oni parolis pri la 38-a UK en Zagreb (Jugoslavujo) kaj decidis dum ĝi aranĝi Diservon, se tio eblos.

F.J. Fishedick, paroĥestro de Oslo, raportis pri la historio kaj pri la nuna situacio de la katolika eklezio en Norvegujo. Oficiala salutletero estis sendata al la komitato de la 75-a Germana Katolika Kongreso en Berlino.

KIEL LA VINO EVOLUIS EN FRANCUJO



'Neordinara malvarmo forprenas al la galianoj la profitojn de moderigita klimato kaj nebligas al ili la produktadon de vino kaj olivoleo. Ĉar ili ne havas la fruktojn de la vinberarboj, la galianoj faras trinkaĵon el hordeo, nomatan bieron. Ili ankaŭ miksas mielon kun akvo kaj uzas la miksaĵon kiel trinkaĵon. Tamen la vino instigas ilin kun verapasio, aŭvide ili trinkas tiun, kiun la komercistoj importas ĉe ili kaj ilia aŭvideco instigas ilin trinki tiom ke ili fariĝas ebriaj ĝis enuormo aŭ ĝis frenezigo. Tial multaj italaj komercistoj, inspiritaj de sia kutima monamo,

faris el tiu emo de la galianoj por la vino fonton de profito. Per ŝipo laŭlonge de la ŝipeblaj riveroj, per ĉaro sur la kampvojoj ili importas la vinon kaj intersanĝe ili ricevas la sklavon, kiu servis ilin'.

Tiel komunikas al ni la antikva historiverkisto Diodoro (V. 26. 2) kaj verŝajne li uzas la vortojn de antaŭlo Poseidonio, kiu priskribas la situacion en Galiujo cirkaŭ la unua jarcento antaŭ Kristo. Tute korektaj tiuj komunikoj ne estas. La vinberarbo estis enlanda en Eŭropo jam dum jarcentoj antaŭ la lasta glacia epoko. Certe ekzistis malgranda loka kulturado de vinberoj en Galiujo antaŭ ol la grekoj komencis importi vinon laŭvoje de la Ronovalo en la sesa jarcento antaŭ Kristo. Per la fondo de la greka kolonio Marseille la

enirpordo por la vinkomercio estis certa kaj kiam post la tria jarcento la greka vinimporto devis cedi sian lokon al la itala, ankaŭ novaj formoj de keramikaj kruĉoj venis al Galiujo, kiuj konigus al la postaj generacioj tiujn ŝanĝojn. Tiu komercio jam estis tiel intensa en la antaŭ-romana Galiujo, ke post la romana okupacio de Sud-Galiujo la Senato de Romo klopodis malpermesi la vinberkulturon en la nova provinco Narbono, kiu etendiĝis de la Pireneoj ĝis Liono. Tiu vinberkulturo versajne tiel ekfloris, ke ĝi fariĝis grava konkuranto por la romanoj. (Cicero, La Respubliko, III.9.16). Tamen oni ne forte observis la malpermeson, ĉar en la dokumentoj oni daŭre parolas pri galia vino, kiu iras al Italujo kiel malmultekosta vino ordinara. En la unua jarcento Plinius komunikas (Nat.Hist.14-16): 'Inter la Pireneoj kaj la Alpoj oni produktas du sortojn da vino, dika sorto (el Beziere) kaj tiu de Narbono. El la fabrikado de tiu lasta la drogistoj faris arto. Oni kolorigas kaj fumigas ĝin. Se oni nur ne miksis spicojn kaj malbonajn ingrediencojn! Eĉ oni adonas alon por ŝanĝi la koloron kaj la aromon.' En tiu modo parolas ankaŭ aliaj verkistoj kaj poetoj kaj vere oni povis pruvi en vinkruĉoj rezinon kaj aliajn aldonaĵojn. La fumigado, t.e. la 'pasteurizado' per rapida maturiĝo kaŭze de provizo ĉe pli altigita temperaturo en la 'fumario', estis kutima rimedo por eviti la multekostan, kapitalintensan provizadon kaj por en mallonga tempo vendi la vinon sur la merkato. La tipoj de spicaj vinoj, kiujn oni priskribas, memorigas nin al diversaj modernaj aperitivoj, kaj diversaj estis de la absint-tipo. En tiu unua jarcento la klasika plibonigita vinberkulturo estis penetranta pli norden ĝis la nunaj Bordo de la Rono (Côte du Rhône) kaj ĝis la regiono de Vienne. La vinarbo kulturita en Alba Helvia, kiu floris nur dum unu tago kaj rapide maturiĝis, produktis 'vinon spicitan', retsinaton preparita kun rezino. En Romo ĝi estis fama. Ne nur la poetoj kiel Martialis konis ĝin, sed la kuracistoj prefere skribis Alba Helvia kiel recepton. La vino el Vienne kostis en Romo la saman prezon kiel bona enlanda vino, nome 1000 sestercojn por 26 litroj. Tiu prezo oni povas kalkuli jene, sciante ke la romaj moneroj valoris unu gramon da arĝento kaj unu litro da valoris 40 gramojn da arĝento. Antaŭe oni taksis tro la ordonon de la imperiestro Domitiano en 92 p.K. Timante la tro granda disvastiĝo de la vinberkulturo, li ordonis ke en la provincoj la duono de la vinberejoj devis esti elradikigitaj. Li celis ke la provincoj kulturu speciale grenon kaj ke la italaj specialaĵoj, kiel la vino, estu protektataj. Tamen la pli novaj esploroj pruvigas ke la ordono nur atingis la paperon. Oni trovas rompitaĵojn de galiaj vinkruĉoj en la centkvindek futoj alta monto da forjetoj, la Monto Testaccio (apud la importhaveno Ostia). Ili datumas el la dua jarcento kaj portas la surskribon 'vino de Béziers, kvinjaraga'. La galia vinberkulturo ankaŭ ne povis grave konkuri kun la itala, ĉar en la unua jarcento la produkto estis tro malgranda kaj en la dua jarcento la enlanda uzo jam estis tiel alta, ke la itala importado en Galiujo devis resti. En la dua jarcento la urbo Liono estis grava importcentro. La vinkomercistoj havis siajn provizorajn deponojn ĉe la bordo de la Rono, kaj ili havis fortan komercan rilaton kun la ŝipistoj. La burgaj militoj kaj la envadoj de la barbaroj de la tria jarcento, speciale ankaŭ la batalo sub Septimo Severo ĉe Liono (197), dum kiu la urbo estis prirabata, metis finon al tiu profito. Intertempe la klasika vinberkulturo jam estis disvastiĝinta en Galiujo norde de Liono. Ĉiu regiono kulturis siajn proprajn sortojn, kvankam ankoraŭ longtempe daŭris la importado de italaj vinoj. Sed iom post iom tiu importado malgrandiĝis. En la dokumentoj oni renkontas konatajn nomojn. La imperiestro Probus en 282 oficiale permesas al Galiujo, Britujo, kaj Hispanujo la kulturon de la vinbero, sed tio nur reguligis ekzistantan situacion. Dum la regado de Konstanteno la Granda oni unuefoje renkontas la Burgonjon de la regiono de Beaune (Panegy. V.6.4.), sed oni ankaŭ parolas pri maljunaj vinberarboj, kiuj devas esti anstataŭataj, ĉar ili datumas de antaŭ Probus. Aliaj komunikoj ebligas ke la vinberkulturo en ĉi tiu regiono jam datumas de la unua jarcento. Same pri la regiono de Bordeaux, kiu en la kvara jarcento estas laŭdata de la poeto Aŭsonio (Epist.9.18) pro la vino kaj la ostroj. Versajne speciala alineo de Plinio (Nat.Hist.14.27) rilatas specialan sorton da vinbero en tiu regiono. Laŭlonge de la Rejno la legioj de Cesaro ne jam trovis vinarbojn (Varro de Rer R.1.7.8.), sed ĉe la Moselo la vinberkulturo certe estis tre konata. Aŭsonio priklamas la Moselvinon (Mosella 21.160) kaj en Trier oni trovis pruvojn ke la vinberkulturo jam estis konata en la prahistorio, kvankam la influo de la klasikaj kulturistoj nur ebligis

la produktadon de bonkvalita sorto. Strange estas la sorto de la historio, kiu faris el la malbonkvalitaj galiaj vinoj en la antikva tempo la mezuron por la vera vinŝatanto, dum ke la antaŭaj laŭditaj kaj multekostaj italaj vinoj nun malfacile povas konkuri kun la francaj. Tio estas la sorto de la instruisto, kiu diligente instruis al la lernanto, kion li mem forgesis: la arton de la plibonigo de la vinbero kaj de la vino, kiuj ambaŭ venis el Grekujo.

(Laŭ: R. J. Forbes).

NOVA ESPERANTO - MONUMENTO

La plej juna urbo de Aŭstrujo, WORGL, estas la unua loko de tiu lando, kiu havas monumenton honore al d-ro Zamenhof. La busto de la kreinto de Esperanto, farita el blanka marmoro, estas verkaĵo de la skulptisto Theodor Ohnesorge. Nun ĝi staras sur la stacidoma placo de la urbo. Je la tago antaŭ la inaŭguro okazis granda koncerto sur la placo. Ĝin sekvis Tirola kantvespero. Dimanĉe la 27a de julio, prelato Triendl, abato de Wilten, celebris pontifikalan sanktan Meson. Kaplano Thalmaier, prezidanto de la katolika germana Esperanto-ligo predikis en Esperanto kaj en germana lingvo. Post la s. meso okazis la inaŭguro. Unue parolis la ŝtata konsilanto Hugo Steiner, direktoro de la Esperanto-Muzeo en Vieno. S-ro Hans Steiner, prezidanto de la Monument-komitato parolis pri la malfacilaĵoj, kiujn la komitato devis venki por starigi la monumenton. La viclandestro de Tirol, s-ro Mayer, senvualigis la buston kaj la urbestro de Worgl transprenis ĝin en la gardon de la urbo kaj subskribis la ĉi-rilatan dokumenton. Knabo kaj knabino deklamis la festpoemon. Kaplano Thalmaier faris la festparoladon. Post tiu ĉi oficiala parto de la festo amuzaĵoj. Posttagmeze oni prezentis filmstrion pri la Esperanto-Muzeo kaj kune la kunvenintoj faris aŭtobusan ekskurson ĉirkaŭ la Kaiser-montaro. La tago finiĝis kun amuza kunesto kaj dancado. La eta Esperanto-grupo de la malgranda urbo Worgl faris sukcesplenan laboron. Ne nur la starigo de la monumento, sed kaŭze de tio la multaj komunikoj kiuj aperis dise en la mondo en la ĵurnaloj pri d-ro Zamenhof kaj Esperanto. Vere la kelkaj samideanoj en Wörgl estas ekzemplo por aliaj en la mondo.

A. W. Withoos.

Impona katolika Di-servo esperantista en Vieno estis la 8an de Junio t. j. okaze de la nunjara ĝeneral-kunveno de **Aŭstria Esperantista Federacio (AEF)** en la kriptoj de Kristo-Regopreĝejo en XVIa distrikto Viena. Forte sonis la komuna E. lingva preĝado kaj kantado. Pastro komandoro G. Plank profundsence en Esp. predikis pri la Sankta Spirito kaj ties efiko dum la jarcentoj en la eklezio. Lia mencio de la martira tempo en la unuaj jarcentoj speciale tuŝis en la atmosfero de la kriptoj kvazaŭ katakombsimila kun obtrizita lumo kaj la altaro en mura niĉo. Ĉeestis la Di-servon la plej granda parto de la ĝeneral-kunvenantoj el Vieno kaj la diversaj federaciaj landoj. AEF lastjare ja estis decidinta, aranĝilandan kongreson almenaŭ ĉiun duan jaron. Pro ŝparo nunjare okazis nur ĝenerala kunveno, antaŭ kiu ankaŭ la katolikaj esp-istoj havis fakkunsidon.

W.M.

K O R E S P O N D A D O

s-ro P.H. Verstraelen, Gasthuisstraat 6, HEERLEN (Nederlando), kiel kolektanto de uzitaj poŝtmarkoj por la Katolika Misio el ĉiuj fremdaj landoj, petas al siaj samideanoj alsendon por la bona celo. Mi certigas vin de mia danko.

Farmaciistoj katolikaj, posendantaj farmacian diplomon donitan de fakultato aŭ supera lernejo, bonvolu skribi al s-ro Jean Barrier, farmaciisto, 34 rue Roger Salengro, DRANCY (Seine), Francujo. En kiu ajn fako de la profesio vi laboras: apoteko, laboratorio, universitato, ktp., mi deziras korespondi kun vi pri la Internacia Federacio de la Katolikaj Farmaciistoj kaj pri profesiaj temoj.

'SPIRITAJ EKZERCADOJ' de Ignacio de Loyola. Havebla ĉe nia Libroservo kaj reprezentantoj. Prezo f. 0,85 aŭ 5 Int. Rkp.

Por la venonta oktobra-numero la manuskriptoj devas esti ĉe ni je la unua de oktobro venonta.